

Rio Esperantista



Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 200 (2016:4)

Okt – Dec 2016

**El Galegio:
Babilado
kaj
Poezia Angulo
kun
Suso Moinhos**

El Kubo:
San Salvadoro
de Bayamo

Literaturo:
Pri Paŭlo Coelho

Scienco:
Akvo mankas,
akvo multas

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Eperantista de Rio-de-Janeiro

N-o 200 (2016:4)

Okt - Dec 2016

75-a jarkolekto

Redaktas: Fernando Pita

Revizias: Túlio Flores

Aranĝas: Allan Argolo

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Suso Moinhos, Paulo Sergio Vianna, Rafael Rodolfo Cabrera Espinosa kaj Allan Argolo

Kovrilo:


Foto: Roberto Alarcón

(flickr.com/people/roberto_alarcon)



Associação Esperantista do Rio de Janeiro


Rua Teófilo Otoni, 135 / 302
telefone: 2467-4296

 aerjrj@hotmail.com
disvastigo.aerj@gmail.com

 www.aerj.org.br

 facebook.com/aerj.esperanto


 youtube.com/user/TVaerj



Rio Esperantista

Informativo da Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro

Edição quadrimestral setembro - dezembro / 2010




RIO



ESPERANTISTA

OFICIALA ORGANO DE ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO DE JANEIRO No 18

JANUARO - MARTO 1997



Enhavo

El la Redakcio	3
Babilado kun Suso Moinhos	4
Pri Paulo Coelho	9
Suso Moinhos (Poezia Angulo)	12
San Salvadoro de Bayamo	13
Akvo mankas, akvo multas	15
Kvizo	20
Raportoj	21

Karegaj legantoj! Kun granda ĝojo mi anoncas al vi, ke nia kara *Rio Esperantista*, post longa marŝado, atingis la memorindan 200-an numeron!!! Fondita kune kun AERĴ, nia bulteno jam havas longan vojon, multajn fazojn, kun venkoj kaj malvenkoj, atingoj kaj retroiroj. Diversaj redaktoroj kaj teamoj kunlaboris, dediĉante sian plejbonon por ke tiu revuo fariĝu ĉiam pli bona kaj pli bunta por vi, asociito de AERĴ.

Ni preparis por ĉi tiu festa numero interesajn artikolojn: nia eksredaktoro Paulo S. Vianna donacis al ni bonegan tekston pri Paulo Coelho. Tiu teksto okazigis alian, en kiu mi montras plian motivon por la furoro de Paulo Coelho, kaj montras al vi unu el miaj plej karaj personaj trezoroj. El la fama kariba insulo, nia kuba amiko Rafael Cabrera alportas al ni tekston pri sia propra urbo, Bayamo, naskiĝloko de la kuba nacia himno.

Nia ĉi-numera intervjuito estas la internacie premiita esperantlingva poeto Suso Moinhos, kiu ĵus eldonis sian debutan libron *Laminarioj* – el kiu unu poemo ornamis nian pasintan numeron, ĉu vi legis ĝin? – kaj kiu denove vizitas nian *Poezian Angulon*. De poezio al scienco, nia grafik-aranĝisto Allan Argolo, al kiu ni ŝuldas la kvalitan belecon de *RE*, parolas pri akvokrizo kaj pri la produktado de la akvo kiun ni trinkas.



Fine, vi same trovos la rubrikojn *Kvizo* kaj *Raportoj*, tiu lasta kun notico kaj fotoj de la belega omaĝo promociita de la karioka urba konsilanto Reimont al Zamenhof, okazinta je la 7-a de Decembro, kaj de la Renkonto de Esperantistoj en Paraiba Valo, okazinta la 20-an de Novembro en urbo Paraiba do Sul.

Ekde tiu-ĉi numero la stabo de *Rio Esperantista* gajnos grandan helpon, ĉar nia karega samideano, la konata vortaristo Túlio Flôres, respondecos pri la reviziado de nia revuo, kvankam okupita pri sia nova interreta kurso, li akceptis la inviton kunlabori kun ni. Mi salutas lin, kaj deziras al li bonan laboron! Bone, antaŭ ol vi ekkomencu legi kaj ĝui vian revuon, mi, nome de tuta estraro de AERĴ, deziras al vi Feliĉan Kristnaskon kaj Ĝojplenan Novjaron 2017!

(Kaj ne forgesu reaniĝi al AERĴ!!!)

Fernando Pita

NOMO: Jesus Moinhos Pardavila.

KROMNOMO: Suso Moinhos.

AĜO: 47.

LOKO: Vigo, Galegio.

AGADO: Filologo, instruisto, esperanta poeto.

Rio Esperantista: Kvankam via nomo, pere de Fejsbuko, estas jam konata de multaj brazilaj esperantistoj, mi petas ke vi unue prezentu vin al niaj legantoj...

Suso Moinhos: Mi estas el Galegio, la parto de Hispanio, kiu situas norde de Portugalio sur la mapoj. Precize mi estas el la havenurbo Vigo. Mi studis galegan filologion en la Universitato de Santiago-de-Kompostelo kaj mia profesio estas instruisto kaj tradukisto. Esperanton mi lernis en 1986, per koresponda kurso, kiel multaj aliaj iberianoj en tiu tempo, kaj mi frekventis la lokan klubon. Jarojn poste mi instruis la lingvon en la Universitato de Santiago, kaj ankaŭ en privataj lingvolernejoj de mia urbo. En 2013 mi havis la ŝancon instrui ĝin en publikaj lernejoj de Mazara del Vallo, Sicilio; tiu restado en la insulo estis el pluraj vidpunktoj tre instrua por mi. Poste venis la realigo de longe kovita revo: studi interlingvistikon. Tion mi ne sukcesus sen grava monhelpo de institucioj kiel *Esperantic Studies Foundation* kaj *Fundación Esperanto*, kaj de unuopuloj. Iom antaŭe mi ekverkis, kaj ĉi-jare aperis mia unua poemaro, *Laminarioj*.



Galegio ruĝe sur mapo de Iberio



Krome, mi komencis okupiĝi pri la literaturaj temoj de la instruista kurso RITE kaj akceptis la proponon kunredakti la literaturan revuon *Beletra Almanako*.

RE: *Vi studas en Poznano, redaktas Beletran Almanakon, verkas poezion... ĉu estas tempo por io pli?*

SM: Nu, verdire la redaktado de la revuo ne forrabas tiom da tempo, ĉar ĝi aperas trifoje jare. Estas kelkaj semajnoj kun pli da premo kaj streĉo, sed intere ni redaktadas ĝin senĉese sed samtempe senhaste. La ceteran liberan tempon mi dediĉas al sportado, naturo, familio kaj amikoj.

RE: *Pli kaj pli via nomo elstariĝas kiel furora poeto en esperanta medio – ĉi-jare vi jam estis dufoje premiita, tamen kiel kaj kiam vi malkovris vian poezion vervon?*

SM: Dankon, sed mi serioze dubas pri tio. Mi publikigis nur unu libron, kaj unu hirundo printempon ne alportas. Mi ĉiam legis poezion. Unu el miaj plej fruaj rememoroj pri tio estas dika volumo, kiun ni uzis en la klaso dum pluraj lernojaroj. Ĝi enhavis literaturajn tekstojn en preskaŭ ĉiuj lingvoj de Hispanio, kaj estis tre stimula. Kiom da pejzaĝoj, bildoj, voĉoj, en unu sola libro! Tio

eblis nur en la epoko de transiro al demokratio (1975-81), kiam la subpremitaj kulturoj povis plene disflori; poste tiu interpopola fluo bedaŭrinde perdis, kvazaŭ ĉiu fermus la pordon al la ceteraj. Tiu kontakto kun plurlingvaj tekstoj estis eble la semo de mia posta interesiĝo pri literaturo, aparte pri poezio.

La proponoj verki en Esperanto venis de la ibera grupo, ĉefe de Miguel Fernández kaj Jorge Camacho. Bona instigo estis ankaŭ la konsiloj de Antonio Valén. Kaj, gvidate de ili, mi transiris en la alian flankon de la spegulo kaj decidis ne nur legadi poezion, sed ankaŭ provi ekverki ĝin. Tial miaj unuaj poemoj estis en Esperanto; se la instigo kaj invito venus, ekzemple, de galegaj poetoj, plej probable mi versus portugale.



Beletra Almanako,
Pluraj Aŭtoroj,
Mondial, Novjorko



RE: *Supre mi komentis pri viaj premioj. Tamen, multaj poetoj/verkistoj estas poraj aŭ kontraŭaj al beletraj konkursoj; kiu estas via persona sinteno rilate al ili, ĉu justa rekono aŭ necesa malbono por ke tiu rekono ekzistu (aŭ io alia?).*

SM: Vidu, se oni verkas esperante, la ŝancoj elmontri la poprajn verkojn malabundas. Des pli se temas pri poezio, ĉar ĝi ne estas la plej populara ĝenro: oni bezonas ian trejniĝon kaj akceptemon por legi poezion. En la E-kulturo mankas poeziaj festivaloj, omaĝoj, komunaj deklamadoj, partoprenoj en manifestacioj, inaŭguroj aŭ festoj. Do premioj povas esti antaŭenpuŝo por plu verki kaj samtempe maniero diskonigi la tekstojn, atingi pli da ricevantoj de la mesaĝo, kaj tio estas tre necesa – ja literaturo estas komunikado. Fortune ni disponas la

“ la plej granda agnosko por poeto devus esti ne premioj kaj distingoj, sed ke oni legas liajn tekstojn ”

radiojn kaj gazetojn, kio ankaŭ helpas. Aliflanke, laŭ mi la plej granda agnosko por poeto devus esti ne premioj kaj distingoj, sed ke oni legas liajn tekstojn.

RE: *Kion pensas la poeto kaj/aŭ la redaktisto de BA pri la nuna panoramo de la esperanta beletro?*

SM: Mi estas optimisma. Ni havas tre bonajn prozistojn, kiel Mikaelo Bronŝtejn, Sten Johansson kaj Trevor Steele – personojn, kiuj ja konas la metion. Krome estas altkvalitaj poetoj, kaj ili lasis por ĉiam en nia beletro versaĵojn superbajn: Mao Zifu, Nicola Ruggiero, Miguel Fernández, Jorge Camacho, Nicolino Rossi... Ankaŭ Anneke Schouten-Buys kaj Benoît Philipe, ĉiu kun sia tre aparta poezia mondo. Mi ŝatus, ke pliaj virinoj kreus poezion, kaj legi pli da verkoj el Afriko kaj Azio.

Tamen oni ne povas forgesi gravan aspekton rekte ligitan kun la literatura produktado, nome, la libromerkaton. Ne malofte niaj eldonistoj kun grandaj strebado kaj dediĉo publikigas librojn nur kun la espero almenaŭ rehavigi al si la investitan monon per vendado. Alifoje (nun mi pensas pri poeziaj



Suso Moinhos deklamas

libroj) ili scias, ke la vendotaj ekzempleroj ne kompensas la elspezitan sumon. Tial mi pensas, ke la respondeco pri la stato de nia librokulturo falas ĉefe sur nin ĉiujn, la parolantojn. Aĉeti librojn (ajnaformatajn) sendube pli helpas nian kulturon ol ĵurnal-reklamoj kaj manifestacioj.

RE: Oni scias pri via intereso pri brazila literaturo. Kial tiu intereso? Kaj plie, ĉu vi pensas ke ĝi iel influas vian verkadon?

SM: La intereso venas de du flankoj. Unue, mi estas galego, do portugalingvulo. La portugalan parolatan en Galegio ni nomas “galega lingvo” pro historiaj kialoj, sed la lingvo estas la sama kiel via gepatra, kompreneble kun lokaj diferencoj. Ne gravas, ke la oficiala versio de nia portugala sekvas hispanecan ortografion; tio estas nur politika decido. En la negocado de la Ortografia Interkonsento de 1990 estis galega neoficiala komitato, kaj kiam en la 80aj jaroj oni prezentis en la Televido de Galegio la sukcesan brazilan serion *Escrava Isaura*, la galegaj vortoj de la dublado *mirakle* koincidis kun la lipomovoj de la aktoroj.

Due, temas pri mia fako kiel filologo. Mi interesiĝas ankaŭ pri aliaj portugallingvaj literaturoj: la galega, la portugala, la afrikaj. Por *Beletra*

Almanako mi esperantigis tekstojn de la santomea-portugala poetino Olinda Beja, kaj baldaŭ aperos aliaj de la angolano Uanhenga Xitu kaj de du portugalaj junaj poetinoj.

“ Aĉeti librojn sendube pli helpas nian kulturon ol ĵurnal-reklamoj kaj manifestacioj ”

Mi ne povus diri, ke specifa brazila aŭtoro influis mian verkadon, ĉar kelkfoje ne facilas malimpliki la interplektiĝon da legaĵoj diverslandaj. Tiusence mi ne baras la aliron al aŭtoroj nek elektas ilin laŭ lingvaj kriterioj, sed klopodas legi poemojn en ĉiuj lingvoj, en kiuj mi kapblas legi. Mi ŝatas la nuntempan brazilan poezion – Ana Martins Marques kaj Ricardo Domeneck estas ege interesaj. La nunaj galegaj poetoj estas voĉoj, kun kiuj mi tre identiĝas: Olga Novo, Yolanda Castaño, Gonzalo Hermo... Aliaj legaĵoj, al kiuj mi ofte revenas, estas Konstantinos Kaváfis, Odysseás Elýtis, Eugénio de Andrade, Al Berto, Jaime Gil de Biedma, Jericho Brown k.a. El la esperanta literaturo mi tre ŝatas Lajos Tárkony, Nikolaj Kurzens, Mauro Nervi, Roberto Passos Nogueira, Mao Zifu, Éva Tófalvi kaj grandan parton el la

elplumaĵoj de la ibera grupo, al kies festo mi malfrue venis.

RE: *Parolu iome pri via libro Laminarioj, kaj pri viaj novaj projektoj...*

SM: *Laminarioj* enhavas miajn poemojn de 2013 ĝis 2016. Mi dividis ĝin en tri partojn: “Fontoj”, kun la unuaj versaĵoj ĝis la premiita “Soneto de la lumturo”; “Tajdoj”, kun diverstipaj poemoj, kaj “Fluoj”, pri vivoj de aliaj personoj. La kunligilo inter preskaŭ ĉiuj tekstoj estas la maro; kelkfoje la maro centras kaj aliffoje ĝi estas nur preteksto por paroli pri diversaj temoj: infaneco, periferioj kaj randoj de amo, maljusto... Kelkaj el ili estas siciliaj poemoj, dum aliaj klare atlantikas.


Du aliajn projektojn mi alfrontas entuziasme. La unua estas jam preta kaj temas pri la esperantigo de grava libro de la galega literaturo: *Memoraĵoj de kampara knabo*. Pri ĝia famo en mia lando mi nur diru, ke la tute unuaj frazoj de la libro estas parkere eldireblaj de granda parto de la galegoj. Por la traduko en la internacian lingvon mi sukcesis, danke al la bonvolo de la heredintoj, reuzi la fascinajn desegnojn de la artisto Isaac Díaz Pardo, ne plu aperintajn en la lastaj galegaj eldonoj. Per tre interesa antaŭparolo, la leganton enkondukos en la verkon

Prof-ino Iolanda Galanes, kiu sendube estas la plej granda spertulo pri ĝi. *Memoraĵoj* baldaŭ aperos ĉe Mondial, kaj mi jam prezentis ĝin en la festivalo ARKONES kaj en internacia tradukokongreso en la Universitato de Vigo.

Alia publikigota verko estas antologio de la nuntempa galega poezio. Mi parolis kun la plej bonaj aŭtoroj, kaj ĉiuj entuziasme akceptis la ideon aperi en esperantaj vestoj. En Galegio ni travivas tre bonan momenton en poezia produktado, kaj traduki la voĉojn de personoj, kiujn mi konas kaj admiras, estas kortuŝa, emociplena tasko.

RE: *Fine, aldonu kion ajn vi volas, pri kio ajn.*

SM: Mi volus inviti ĉiujn plu legi literaturon en la internacia lingvo. Serĉu inter pluraj verkistoj, ĉu originalaj, ĉu tradukitaj, ĉar bonaj tekstoj atendas malkovron. Kaj ne forgesu doni ŝancon al poezio!



Vizitu la retejon de Suso Moinhos:
<http://suso-moinhos.webnode.pt/>

Paŭlo Coelho: la plej multe tradukita potugallingva aŭtoro

Paulo S. Vianna

La brazila gazetaro informis antaŭ nelonge, ke la brazilano Paulo Coelho denove aperas kiel la plej multenombre tradukita aŭtoro, verkanta originale en la portugala lingvo. La informo venas el respektinda institucio: *Index Translationum*, sub la respondecado de UNESKO. Liaj verkoj atingis la mirindan ciferon de 1098 tradukoj al plej diversaj lingvoj. La Nobel-premiito José Saramago, el sia alta pozicio, apenaŭ atingis la duan lokon, kun 534 tradukoj.

Kion la ordinara amanto de brazila literaturo devas pensi pri tio?

Malgraŭ la granda sukceso de Paulo Coelho flanke de la publiko, ĉu en Brazilo, ĉu eksterlande, ne mankas akraj kritikoj de la fakuloj pri literaturo al la kvalito de liaj libroj.


Inter tiuj kritikoj, oni povus el-starigi du: la tro edifa moralisma enhavo kaj la iom banala stilo. Ni devas honeste

konsideri, ke tiaj kritikoj estas tre subjektivaj. Oni devas ankaŭ indiki, ke la aŭtoro verkas por sia publiko, ne por fakuloj. Kaj la statistiko montras, ke lia publiko estas fidela kaj multenombra. Ĉu tiu objektiva fakto ne meritas respekton?

Du demandoj tuj starigās:

1. Ĉu la kvanto da tradukoj indikas la kvaliton de la originaloj?
2. Ĉu multenombraj tradukoj eventuale rezultas de trafa propaganda diskonigado de la verkoj?

Responde al la unua: nepre ne! Kvanto da tradukoj ne rilatas al kvalito de la originalo. Ĝi rilatas nur al la interesiĝo de la publiko. Jam okazis, ke furoraj romanistoj atingis amason da tradukoj tra la tuta mondo, kaj poste falis en sen rimedan forgeson, pro manko de kerna konsisto. Alivorte, ĝi signifas, ke tiu sukcesa, multe tradukita aŭtoro trafis en la guston de multaj homoj el multaj landoj. Tamen, ĝi neniel povus esti indiko de *malbona kvalito!* Ni memoru, ke la brazilanoj, ĉu simplaj legantoj, ĉu fakuloj, dum longa tempo fieris pri siaj multe tradukitaj aŭtoroj, konsiderataj kiel altnivelaj kaj tamen furoraj: Erico Verissimo kaj Jorge Amado. Kial



nun rifuzi rekonon al Paulo Coelho? Mi ripetas: la kvalito de literaturaĵo estas subjektiva juĝo.

Responde al la dua demando: mi jam aŭdis, ke Paulo Coelho atingis sian grandan sukceson danke al trafa strategio de diskonigado kaj propagando. Mi ne povas konfirmi tion, mi do nekas, nek jesas. Oni povus nur redemandi: ĉu propagando estas ia krimo aŭ peko? Se tia estas la klarigo pri la sukceso de nia aŭtoro, ĝi ekvivalentus al la aserto, ke li sukcesas trompi la tutan mondon. Ĉu la legantoj en la tuta mondo estas naivuloj, kiuj falis

en lian magiistan iluziigadon? Ĉi tiu ebleco ne ŝajnas al mi realisma. Kio do okazas?

La “fenomeno” Paulo Coelho postulas pli profundan analizon. Ĉu la literaturo en nia moderna mondo suferas drastan ŝanĝon? Ĉu la arto, entute, estas alia, en la 21-a jarcento? Ĉu la legantoj soifas je edifaj kaj facile legeblaj libroj? Kaj ĉu tiu soifo estas bona aŭ malbona signo? Kio estas pli grava en literaturo: ĉu la formo (stilo), aŭ la enhavo (mesaĝo)? Eble la simpatia homo Paulo Coelho, sidanta en luksa domo en Eŭropo, amuze ridetas pri tiaj plej diversaj opinioj. Inkluzive de ĉi tiu modesta artikoleto, per kiu mi opinias preskaŭ nenion...


Unu respondo al Paŭlo Sergio Vianna

Fernando Pita

Nia kara Paŭlo Sergio Vianna sin demandas, en teksto, kiaj estas la motivoj por la tiel akraj kritikoj kaj tiel furora disvendado de la libroj de alia Paŭlo, ĉi-foje Coelho. Bone, li mem trafe asertas, ke detala pridiskutado de tiuj demandoj estus longegaj, ĉar ĝis nun la brazila literatura medio ne sufiĉe “digestis” tiun aŭtoron, kiu estas, hodiaŭ, la plej disvendata individua verkisto de la mondo. (En Okcidento nur la Biblio,

kaj, en Oriento, nur la Korano, venkas lin; sed mi kredas ke Coelho ne volas disputi kun la Aŭtoro de tiuj du libroj pri tio, ĉu ne?)

Sed mi povus prezenti unu faktoron kiu elmontras kial Paŭlo Coelho estas tiel ŝatata de siaj legantoj: li vere zorgas pri ili! Mi klarigos: En beletra mondo ne estas rare ke verkisto solene ignoru la legantojn; agante kiel stelulo, furora verkisto ĝenerale kaŝiĝas en sia ebura turo, kaj simple



La Alkemiisto
Paulo Coelho
(trad. Carlos Valle)
Memeldono, 2007


ne rimarkas ke estas personoj – kiuj aĉetas liajn librojn! – kiuj kelkfoje meritas iom da atento, ĉu en formo de simpla foto, de aŭtografo, aŭ eĉ de respondo al tvitera mesaĝo. Kontraŭe, Paŭlo Coelho ĉiam persone respondas ĉiujn mesaĝojn de li ricevitaj. Li vere flegas sian legantaron: invitas ilin al kunvenoj kaj prelegoj, en urboj kie li estas, pozas por miloj da fotoj,

aŭtografas ĉiujn ekzemplerojn de siaj libroj (eĉ de pirataj kopioj!) kiam petite.

Pruvo el tio estas ke, en la fora jaro 1990, 21-jara esperantisto, ĵus leginta *Brida-n* (lian 4-an libron), decidis testi ĉu li vere respondas leterojn. La ulo, kiu ankaŭ legis *La Alkemiisto-n*, skribis leteron al li demandante ĉu li jam studis Esperanton (nia lingvo, kiel ni ĉiuj scias estas menciata en tiu verko). Unu aŭ du monatojn poste, la junulo ricevis lian respondon, en formo de letero kiu estas, hodiaŭ, unu el liaj plej karaj trezoroj. En ĝi, Paŭlo Coelho fakte ne respondis ĉu li

parolas Esperanton aŭ ne, tamen, iel ajn, la respondo mem estas korvarmiga, ĉu ne?

Do, kara Paŭlo – ĉi-foje Viana – jen unu plia kialo por pravigi la furoron kaŭzitan de via samnomulo.



Luiz: Ĉiu lingvaĵo kiu proksimigas la homon estas lingvaĵo sendita de Dio.
Eĉ tiaj lingvaĵoj kiaj la Amo, kie la vortoj ne necesas.
Brakumon, Paulo Coelho

Ĉi-nokte

Ĉi-nokte mi bezonas vian bruston subvange
por fuĝi el la nigraj stratoj,
la travivitaj urboj,
la sezonoj pendantaj el la arbobranĉoj,
glitantaj el fenestroj avenuai kaj ĉemaraj.
Io de mi defalis,
ion mi dissemadis espercele
inter la palmoj de Sebto, sur la vojoj de Mazzara,
en la noktoj humidaj kaj silentaj de Lisbono –
sed ĉio estis vane senspiriga.
Doloras la cikatroj de la tempo,
vi scias,
la spuroj de la ligoj al la masto,
kaj mi emas la velojn ekmalhisi.
Ĉi-nokte mi ne volas pinti sur la jaroj,
mi volas survali vin, kroĉiĝi al la nuno
per la hela tempo de vilaĝa bubo
tenanta kontraŭvente sian kajton.

Rafael Rodolfo Cabrera Espinosa

San Salvadoro de Bayamo, la urbo kiu estis la dua fondita en Kubo de S-ro Diego Velázquez, konkerinto de la hispana Reĝo, la 5an de novembro 1513.

Hodiaŭ Bayamo estas la centra politika kaj ekonomia municipo de la provinco Granmo.

En Granmo estas 13 municipoj, de ili dependas la agrikultura ekonomio. Ĝi havas teritorian vastecon de 8.375 kvadrataj kilometroj kaj troviĝas en la suda orienta parto de la lando. Samlima kun la provincoj Las Tunas, Holguíno kaj Santiago de Kubo.

En ĉi tiu provinco okazis multaj historiaj faktoj por la definitiva libereco de la kubanoj, kiam komenciĝis la ribelemo de la Kaciko Hatuej, la sendependiga krio en Demajagua, la Nacia Himno, la morto de Jozefo Martí en Dos Ríos kaj la elŝipigo de la Granma jakto.

Bayamo estas lulilo kaj scenejo por grandaj homoj, kiuj batalis por la libereco de la patrujo, la nacia penso kaj la kuba kulturo. Inter ili estas Carlos Manuel de Céspedes, Francisco Vicente Aguilera, Juan Clemente Zenea, Francisco Maceo Osorio ktp.

En Bayamo naskiĝis Carlos Manuel de Céspedes y del Castillo, li preferis oferi sian filon Oskaro, dirante, “Oskaro ne estas mia



Bayamo ruĝe sur la mapo de Kubo

ununura filo, mi estas la patro de ĉiuj kubanoj” pro tio la kubanoj nomas lin, “La Patro de la Patrujo”. Li estis ankaŭ la Unua Respublika Prezidanto de Kubo, la 10an de oktobro 1868; post tio li liberigis siajn sklavojn.

Ankaŭ Petro Figueredo (Peruĉo)



La preĝejo de San Salvadoro de Bayamo

naskiĝis en la urbo Bayamo. Li estis la kreinto de la Nacia Himno kaj apud Céspedes ili interkonsentis kun la popolo la 12an de januaro 1869 bruligi la urbon antaŭ ol la malamiko prenu ĝin. Do Bayamo estis bruligita, la malamiko foriris el ĝi. Ni celebras tion ĉiujare.


En la urbo estas multaj historioj pri nia sendependiĝo, antaŭ kaj post la Revolucio. En ĝi troviĝas muzeoj, historiaj lokoj, hoteloj, parkoj, placoj, kinejo, kulturinstitucioj ktp. Ĝi estas la ĉefa urbo de la provinco Granmo. Krome vi povas vidi tradiciajn ĉevalĉarojn uzatajn por veturi tra la urbo. Ankaŭ ekzistas multaj arboj, muraloj, vendejoj, la rivero Bayamo, la Nacia Domo, preĝejoj ktp.

**Infana Karnavalo en Bayamo**

En la monato aŭgusto ni festos la karnavalon, kiu estas ĝenerala festo en kiu la homoj dancas, drinkas bieron, rumon kaj trinkas refreŝgaĵojn ktp. Ni ridas, kuras dum

5 tagoj, matene, tage, vespere, nokte kaj frumatene.

La 5an de novembro ni celebras la fondiĝtagon de la urbo. En Bayamo troviĝas la iama kazino Carlos Manuel de Céspedes, loko sturmita de revolucianoj kiam ili batalis por la vera libereco de la kuba popolo por venki la malamikon kaj atingi la Revolucion kiel politikan fenomenon por nia lando, nun ĝi estas la muzeo Ĥiko López.

**Karnavalo en Bayamo**

Se vi deziras viziti la urbon Bayamo kaj volas kontaktiĝi kun esperantistoj, ni invitas vin, vizitu nian sidejon en la kulturdomo de Bayamo.

Bonvolu, kontaktu nin, skribu al ni kaj vi trovos bonajn amikojn!

Venu al Bayamo, konu ĝin!

Granma Esperanto-Filio

Apartado Postal 48, Bayamo 1,
85100 Granmo, Kubo

Retpoŝto: esperanto@crisol.cult.cu
cabrerae@infomed.sld.cu

Telefono: 053-23-42-9136

Krizo kaj alternativoj de akvo-produktado¹

Allan Argolo

Enkonduko

Ĉiu antikva civilizacio formiĝis proksime de lokoj kun abundo de akvo kaj grundo taŭga por kultivado, ĉar akvo kaj nutraĵoj estas nemalhaveblaj naturaj rimedoj al homa vivo. Dum eraoj la natur-homa interrilato restis ekvilibra kaj malgrangaj homamasoj uzadis *daŭripovan* kvanton de akvo por siaj agrikulturkaj bred-sistemoj. Tamen, post la industriaj revolucioj kaj intensaj sciencteknikaj evoluoj, kiuj ebligis demografian eksplodon, elĉerpiĝo de bazaj naturaj rimedoj iĝis konstantaj fantomoj, tiel ke la temo akvokrizo oftigis en nuntempaj komunikiloj – kaj sentebblas en la ĉiutaga vivo de multaj familioj. Ĉi-kuntekste, la nuna teksto celas ĝenerale pritrakti kelkajn problemojn de akvo-produktado ĉefe en Brazilo.

La konceptoj

Kiam temas pri akvo, oportunas konsideri la akvociklon, kies hidrologia difino estas *la globa fenomeno de fermita cirkulado de akvo inter tersurfaco kaj atmosfero, esence impulsata de sunenergio ligita al la gravito kaj al la rotacio de la Tero*². Resume, en la planedo konserviĝas ĉiam la sama kvanto de akvo, kiu ĉiam renoviĝas laŭ la pluraj

fizikaj statoj de la materio. El la tuta ciklo, reliefigendas jenaj konceptoj por disvolviĝo de nia temo:

- la precipitiĝo, kiu provizas akvon al la tersurfaco,
- la enfluo de akvo en la teron, kiu ebligas reŝarĝon de subtera akvo. Tiu lasta siavice ankaŭ reŝarĝas surfacajn akvojn kaj
- la influo de la vegetaĵaro en la ciklo, ĉu pro potencigo de vaporado/transpirado kaj temperatura konservado (klimata rolo) aŭ pro la tenado de akvo dum pluvoj kaj protektado de surfacaj akvoj (fizika rolo).

Akvoproduktado oni nomas la industriskalan procedon por havigi akvon kun specifa kvalito. Ĝi povas esti dividita je tri etapoj, nome kolektado, purigado kaj liverado. Kolektado ordinare okazas surface aŭ subtere, depende de disponebleco. Surfacaĵajn akvojn oni kolektas el riveroj, lagoj kaj tre ofte el akvo-rezervejoj (artefaritaj akumululejoj de akvo). Tiujn oni konstruas specife por certigi la akvoprovizecon, por produkti hidrelektran energion aŭ por ambaŭ. Subterajn akvojn oni kolektas el grundakvejoj kiuj povas esti freatikaj (pli proksimaj de la grundsurfaco kaj sub atmosfera premo) aŭ

artejoj (pli profundaj kaj sub premo pli granda). De kolektado sekvas la purigprocedoj por atingi la laŭleĝajn kvalitojn de akvo. La procedoj varias laŭ uzo (urba, industria, agrikultura) kaj laŭ kvalito de la kruda akvo, sed ordinare konsistas el fizikaj kaj kemiaj procedoj. Fine, okazas la liverado per longaj hidraŭlikaj sistemoj al ĉiaj uzantoj. La uzado de akvo rezultigas je rubajakvo, t.e. akvo malpura kaj “forĵetenda” kiu neeviteble revenas al la natura akvociklo. Belas la sistemo sed ĝi ankaŭ misfunkcias, tiom ke ofte oni kredas vivi je akvo-kriza periodo.

La problemoj

Eventuale, iu sin demandas: kiel eblas akvomanko se la ciklo de akvo garantias ĝian ĉeeston? Krom la fakto ke temas pri mondskala sistemo kaj do la kvanto de akvo nature varias inter regionoj, la problemoj troviĝas en ĉiuj instancoj de la ciklo.

Unue, klimatsanĝiĝo foje provizas maloftajn kaj torentajn pluvojn en pluraj regionoj, foje preskaŭ neniigas pluvojn en aliaj. Sekve, pro senarbarigo, kompaktigo aŭ netralasigo de la grundo, la precipitiĝinta akvo forfluas sur la grundsurfaco rekte al oceanoj (iĝas sala akvo). Rezultas la



La akvociklo funkcias, danke al la energio, kiu provizas la varmo de la suno.

La suno forvaporigas akvon el la oceanoj. Tiu nevidebla akvo-vaporo superflugas en la atmosfero, kie la aero estas pli malvarma.

La akvo por kondensigas en nuboj.

Vulkanoj produktas akvo-vaporojn, kiu formas nubojn.

Aerfluo movas nubojn ĉirkaŭ la tuta planedon.

Akvo-gutoj formas en nuboj, kaj poste falas al la tero kiel precipitado (pluvo kaj neĝo).

En malvarmaj klimatoj, la precipitado amonias kiel neĝo, glacio kaj glaciiveroj.

Neĝo povas fandi kaj forlasi akvon en riverojn, oceanojn kaj teron.

Parto de la glacio iĝas rabeo-vaporo kaj iras en la aeron sen fandi.

Pluvo sur la tero forfluas malstarene provizante akvon al lagoj, riveroj kaj oceanoj.

Iom de la pluvo enfluas en la teron, kaj se ĝi iras sur la profundajn ĝi restas en la subtera akvo.

Akvo el lagoj kaj riveroj povas enflui en la teron. Akvo iras en la teron pro gravito kaj premo.

Plantoj sorbas la akvon subteran kiu estas proksima de la tera surfaco.

Iom el la subtera akvo fluas en riverojn kaj lagojn, kaj ankaŭ povas enflui de la tera surfaco kiel akvo-fonto.

Plantoj sorbas subteran akvon per radikoj kaj el la folioj forvaporigas akvon.

Iom el la subtera akvo iras tre profundajn kaj restas tie dum longa tempo.

La subtera akvo fluas en la oceanojn kaj disvolvas la salicidon de la akvociklo.

neokazo de grunda enfluo kaj de reŝarĝo de subtera akvo. Konsekvence, la malaltiĝo de subterakva nivelo kune kun maloftaj pluvoj pelas al malaltiĝo de la akvonivelo en riveroj kaj lagoj.




Aldone rolas la sistemoj de akvoproduktado. El imponaj akvo-rezervejoj vaporiĝas proporcie giganta kvanto da akvo. El grundakvejoj oni kolektas akvon kvazaŭ ĝi estus senfina kaj ne konsideras la reŝarĝan problemon. Je la akvo-purigado oni pli kaj pli frontas fortan poluadon, tiel ke la procedo postulas pli da kemiaĵoj por atingi trinkeblecon, iĝas pli kosta kaj malpli salubra.

Sed dum liverado, okazas kerna problemo: la tielnomataj perdoj. Laŭdifine, reala akvoperdo rilatas al la *kvanto de akvo provizita de la liversistemo kiu ne atingas la klientojn pro problemoj de konservado aŭ mastrumado de la propra sistemo*³ (t.e.

akvo perdita pro nekompetenteco de mastruma entrepreno), kaj ŝajna akvoperdo rilatas al la *kvanto de akvo uzita de la klientoj sed ne enkalkulita de la entreprenoj*⁴ (t.e. akvo ŝtelita per piratado, kiu ĉiam ligiĝas certagrade al reala akvoperdo pro la pirataj konektoj en la sistemo). Ambaŭokaze, la koston pagas la socio. Por bone taksi la problemon, la averaĝa internacia akvoperdo situas inter 40–50%. En Brazilo, la averaĝa akvoperdo de ŝtataj entreprenoj estas iom malpli granda (37%), sed 9 el la 27 entreprenoj perdas pli ol 50% de siaj akvoj kaj la plej granda perdo estas je 76,5% (CAESA/Amapao).

Fine, akvo-uzado kompletigas la krizan skizon. En Brazilo, ĉ. 72% de la produktita akvo iras al agrikulturo kaj el tio, 45% perdiĝas. Bredado respondecas pri aliaj 11% de la brazila akvo kaj interesa fakto estas ke la finaj produktoj, kiuj elspezas tiujn 83% de akvo, grandparte iras al eksterlando. Tiam evidentiĝas koncepto de virtuala akvo, kiu rilatas

Uzo de Akvo en Brazilo




al la nereakta komerco de akvo alligita al specifaj varoj, kiel nediskunigebla krudaĵo⁵. Laŭ tiu ideo, kiam Brazilo eksportas sojon kaj viandon, ĝi ankaŭ eksportas la tuton da akvo (ne)rekte uzita dum la produktado, kaj la nombroj estas astronomiaj: 50,3 kaj 34 miliardoj da m³ por sojo kaj viando, respektive, en 2005. Pensigas ankaŭ la fakto, ke iras la akvo alligita al la varo, sed restas la rubaĵakvo kaj la mediaj damaĝoj.

La solvoj (ĉu?)

La plej disvastigata kontraŭkriza admono estas la konscia uzado kaj ŝparado de akvo fare de la vasta socio. Tio certe bone efikas, sed malmulton ŝanĝas grandskale. Necesas ja optimuma uzado de akvo en agrikulturo kaj bredado, pere de kontrolado, profesiigo kaj akvoŝparaj teknikoj kiel lokaj irigacioj (gutado, mikroaspergado) kaj subirigacio. Aldone, endas zorgi pri la kemiaĵoj uzataj, tiamaniete ke ili ne poluu la grundon, la grundakvojn kaj la surfacajn akvojn.

Certe la plej okulfrapa ŝanĝendaĵo estas la malaltigo de akvoperdo, kaj la propono de la Internacia Akvo-Asocio estas duonigi ĝia nombron

LA NEVIDEBLA AKVO



dum jardeko. Teknikistoj agnoskas ke nula akvoperdo estas utopia kaj finance neatingebla, sed ja eblas optimuma situacio kiaj en japanaj urboj (11%), aŭstaliaj urboj (16%) kaj eĉ la brazila urbo Pelotas (6,8%). Por atingi tion, gravas la premo de la civila socio sur entreprenoj kaj politikaj sferoj.

Rilate al kvanto, ne multon eblas fari je la purigada instanco, sed de financa vidpunkto, gravegas la kvalito de la kruda akvo. Indas ĉesigi la poluadon de surfacaj akvoj, ĉefe la elverŝo de krudaj rubaĵakvoj (urbaj kaj industriaj), kaj pri tio respondecas la akvo-entreprenoj kaj industrioj (specife pri rubaĵakvoj eblas pritrakti en alia oportuno).

Konsiderante la ciklon de akvo, simplaj solvoj kiaj rearbarigo kaj



tralasigo de grundoj por la akva enfluo, protektado de bord-vegetaĵaro por konservado de surfacaj akvoj, kaj pli profitaj uzoj de drenakvoj kaj pluvakvoj jam donas konsiderindan rezulton.

Por defii veran krizon, oni alproprigu al si la plejn novajn (kaj multekostajn) akvoteknikojn, kiaj estas akvoreciklado kaj sensaligo. En kelkaj regionoj, tiuj teknologioj estas neflankenlaseblaj kaj la uzoj senlime oportunaj (reŝarĝo de grundakvejoj, irigacio, urba purigado, industria uzado, distra uzado). Ekzemple, la usona ŝtato Kalifornio jam de jaroj uzas ambaŭ teknikojn kaj pere de merkataj kampanjoj strebas konvinki la popolon pri la trinkebleco de reciklita akvo. Pravigas tion la vera malabundo de akvo tie – la ĉefurbo Sakramento ricevas averaĝan pluvon je 470 mm jare. Aliflanke, la averaĝa pluvo en San-Paŭlo estas de 1.441 mm jare.

La konkludo

Kompreneble, la ĉiam pligrandigantaj loĝantaroj iom post iom postulos pli elstarajn teknikojn, kaj jam en Brazilo oni uzas, etskale, reciklitajn akvon por urba purigado kaj industriaj aferoj. Sed la nuna tiel nomata akvokrizo postulas pli precizan mastrumadon de la sistemo fare de entreprenoj kaj registaroj kaj respekton al la medio. Intertempe, daŭre validas la frazo de Pero Vaz de Caminha, kiu jam en la unua letero pri Brazilo skribis ke tie *Akvoj estas multaj, senfinaj*.

¹ Adaptita resumo de prelego okazigita kadre de BEL-konferencoj 2016, en urbo Petrópolis.

² TUCCI, C.E.M. (2014). Hidrologia: ciência e aplicação, 4ª ed. Editora da UFRGS/ABRH, Porto Alegre.

^{3,4} ABES. 2013. Perdas em sistemas de abastecimento de água – www.abes-sp.org.br/arquivos/perdas.pdf

⁵ OJIMA, RICARDO; DO NASCIMENTO, THAIS TARTALHA. Água virtual, escassez e gestão: o Brasil como grande “exportador” de água. *Ambiente & Sociedade*, v. 10, n. 1, p. 83-96, 2007.

Disponebla ĉe: <https://goo.gl/B4Lyvo>

Membrigu en AERJ por 2017 kaj subtenu la e-movadon en Rio-de-Janeiro

Aligo ĉe aerj.org.br/associe-se | Informoj ĉe divstavigo.aerj@gmail.com



Kvizo

En la numero 198 de *Rio Esperantista*, ni prezentis kvizon kiu supozeble estis tre facila por tiuj kiuj vizitas kariokajn esperanto-asociojn. Tamen, la ribriko *Kvizo* ne aperis en nia lasta eldono (RE199) kaj la demando restis senresponda. Do, jen oportune la solvo al tiu “grandega” enigmo: tiu foto de la 20-aj jaroj temas pri la Placo Karioka (*Largo da Carioca*), en urbocentro de Rio. Kaj proksime de tiu placo, troviĝas Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE)

Placo Karioka en la 20-aj jaroj kaj nuntempe.



Jen la ĉi-numera kvizo: Se vi iras al la urbocentro de Rio, vi certe pasas antaŭ tiu loko, aŭ vi eĉ eliras el ĝi mem aŭ, plibone, el la nova edificio

kiu anstataŭis tiun de la foto fine de la jaroj 1930. Ĉu vi almenaŭ rekonas tiun lokon?



Bunta Omaĝo al Zamenhof en la Municipa Ĉambro de Rio

Fernando Pita

En lasta 7-a de Decembro, okazis grava momento por la karioka esperantistaro. Dank' al la urba konsilanto Reimont, kiu organizis solenan omaĝon al nia Majstro ene de la Municipa Ĉambro de Rio-de-Ĵanejro, diversaj esperantistoj tie kunvenis por kune celebri la vivon de Zamenhof. La omaĝo komenciĝis je la 10-a per malfermo farita de nia

urba konsilanto, kiu cedis la vortuzon al nia kunulo Bentalho, kiu reliefigis la gravecon de Esperanto kiel armilon por kontraŭbatali la atakojn de l' usonlingva imperiismo en la mondo. Poste parolis nia kara samideano Helder, instruisto de Esperanto en la Programo de Modernaj Alilandaj Lingvoj (PROLEM) en la *Universidade Federal Fluminense (UFF)*. Helder reliefigis la rolon de Esperanto kiel interpopolan komprenigilon, kaj iom diris pri sia nova rolo kiel instruisto de nia lingvo en tiu universitato (Mi devas konfesi ke mi estis surprizita, kaj kortuŝita, de lia afabla mencio al mia nomo kiel peranto inter la Esperanta kaj akademia mondoj. Dankon, amiko!). Helder estis sekvita de la kunordiganto de Prolem -UFF, Prof-ro Arnaldo Rosa, same ĉeestanta, kiu ankaŭ refortigis la paroladon de Bentalho, montrante al ni la politikan gravecon de Esperanto. Li estis sekvita de Givanildo Costa (KKE) kiu, kiel kutime, predikis al la ĉeestantoj pri la interna ideo de Zamenhof. Ĉiuj paroladoj estis dividitaj de artaj momentoj de niaj karaj Neide Barros Rêgo kaj Graça Thuler, kiuj kantis kaj deklamis poemojn omaĝe al



Supre: tribuno de la Municipa Ĉambro de Rio-de-Ĵanejro dum la solenaĵo. Maldekstre: la vic-konsulo de Ĉinio. Malsupre: ĉeestantoj en la Municipa Ĉambro de Rio.



Zamenhof. Same ĉeestis la eventon la novaj konsulo kaj vickonsulino de Ĉinio en Rio-de-Janeiro; ili parolis al la publiko pri la graveco de Esperanto kiel pozitiva elemento en la interrilatoj inter sia lando kaj la nia. Poste, Givanildo estis omaĝata de la kooperativanoj pro sia senlima laborado en la prezidanteco de KKE, kiu samtempe omaĝis Reimont-on pro lia kunlaboro al nia loka movado.

La omaĝo estis fermita per parolado farita de nia urba konsilanto Reimont, kiu parolis al ĉiuj pri la graveco de Zamenhof kaj de la Esperanta movado en konstruado de nova, pli justa mondo. Post la ceremonio, tipa solenaĵo kiu rapide fariĝis kvazaŭa festo, okazis malgranda matenmanĝo kaj lotumado de libroj al la ĉeestantoj.

Renkonto en Paraíba do Sul

Paulo S. Vianna

La 20-an de novembro 2016 okazis unu plia entuziasma renkonto de Esperantistoj en la regiono de la Paraíba Valo, en la urbo Paraíba do Sul, ŝtato Rio de Janeiro. Partoprenis pli ol 40 homoj el la ŝtatoj Minas Gerais, São Paulo kaj Rio de Janeiro. Aŭspiciis la eventon Asocio Esperantista de Rio de Janeiro kaj la loka klubo. La kunsido okazis en ĉambro de la lernejo Prof. Manoel Gonçalves d'Ascensão, en la urbocentro.

Matene, post amika akceptado kun lunĉo, la programo komenciĝis per "Guto da Gramatiko" (P.S.Viana). Poste, oni diskutis kaj proponis diversajn interesajn strategiojn por diskonigo de Esperanto en la regiono: aktivuloj el pluraj urboj raportis pri siaj spertoj tiukampe, sub la reĝisorado de Márcio Santos,

prezidanto de AERJ.

Posttagmeze, Benedito Pereira prelegis pri la planoj de AERJ pri starigo de budo de Esperanto en la Internacia Librofoiro en Rio de Janeiro, en 2017. La publiko vigle interesiĝis, apoge al la iniciato.

Sekve S-ro Dino Boladão, el la urbo Tres Tios, prezentis siajn tradiciajn sambojn en Esperanta vesto.

Finiĝis la renkonto kun multaj gajaj kantoj, en amika etoso.

Dum la tuta tago funkciis eta libroservo.





Informoj ĉe esperanto.org.br



**PRAKTIKA KURSO
DE TRADUKADO
PORTUGALA-
ESPERANTA
per la Reto**

www.esperanto-mg.com.br/tradukado

campanha

ESPERANTO



NA BIENAL
DO LIVRO
2017 RIO



Participe e ajude novamente a divulgar o esperanto num dos maiores eventos culturais do Rio de Janeiro

Info: disvastigo.aerj@gmail.com